**N I A V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **JULIO-AŬGUSTO 2000**

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto

**EKSTERLANDE**

"Esperanto" Radikala Asocio prezentis sian eldonaĵon: "Viaggio di studio - Esplorvojaĝo - Voyage d'etudes", nefinita romano de Jules Verne en kies paĝoj esperanto estas pritraktita. La teksto aperas en la franca originalo, en la itala kaj esperanta tradukoj.

**IBERA VENTO BLOVAS EN FINLANDO**

En Julio okazos Kultura Esperanto Festivalo kun aktiva partopreno de la "Ibera Skolo". Jen la prelegoj de la "madridanoj": Jorge Camacho, *Esperanta scienfikcio, Esperanta rokliriko. Ĉu esperanta folkloro ekzistas?* Miguel Fernández kiu prezentis *Muzikpoema spektaklo pri García Lorca*, ankaŭ prelegos tri tagojn pri la temo *De Neves al Zifu, ĉu Nervi aŭ vervi?,* pri la verko de la famaj portugala kaj la ĉina aŭtoroj. . Aparte de Gonzalo Neves (Portugalio), ankaŭ Miguel G. Adúriz, Antonio Valén partoprenos en la programeroj: debatoj, teatraĵoj, atelieroj, distra programo por infanoj, ktp.

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

2-a Apud mara Kultura Esperanto-Semajno Valencio 4-8a de julio 2000.

"MEDITERANEA KULTURA E-SEMAJNO" 10-15 julio 2.000.
Fakultato pri Filologio de la Universitato de Valencia

85-a UK Tel-aViv (Israelo) en la jaro 2000 kaj la 86-a UK Zagreb en 2001

8ª Internacia Esperanto-semajno de la Kulturo kaj Turismo 30ª de septembro-7ª de oktobro 2000. Blanes (Girona). Pliaj informoj Tel: 937 275 021 kaj luis_serrano@mixmail.com

**HISPANIO**

Abonantaro de la revuo Literatura Foiro per voĉdonado elektis la libron "Karnavale" verkita de Abel Montagut, eldonita che IEM en Vieno, kiel verko de la jaro 1999 por LF-legantoj.

La "Grupo Folclórico de la Casa de Aragón en **Valencia"** gajnis premion en la Folklora Festivalo de Torun, Pollando. Esperanto estas la sola laborlingvo en tiu festivalo, Augusto Casquero vojaĝis kiel interpretisto. La Grupo, kiu gajnis la unuan premion en 1998, estis invitita tiu-ĉi jaro okaze de la 20-a festivalo.

Madrida Esperanto-Liceo partoprenis en "Maratón de Cuentos" organizita en Guadalajara. Ĝi sendis legendon kiu aperis en esperanto en la revuo de ILEI kaj estis tradukita, pere de esperantistoj de la tuta mondo al 24 lingvoj inter ili kelkaj en Afriko (svahila, ioruba), la latina, kaj interlingua. La organizanto, Urbodoma Biblioteko, menciis la partoprenon de esperantistoj en diversaj amasmedioj. Al ĉiuj kiuj sendis tradukojn: Dankon!

Ĉiujare la esperanto grupo de **Tenerife** ESTO aktive partoprenas en la flortapiŝfarado, okaze de la Kristo-Korpo Tago. La tapiŝo estas kutime farita vid'al vide de nia Societo kaj tre proksime de la Episkopa Sidejo de Tenerifo. Multaj homoj promenas rigardante la tapiŝojn kaj interesiĝas pri nia lingvo.

| **NIA VOĈO** | **JULIO-AŬGUSTO 2000** | **1999** |
|---|---|---|

**NUEVO MÉTODO DE ESPERANTO**

Madrida Esperanto-Liceo reeldonis, en parte aktualigita versio, la verko de Fernando de Diego "Nuevo método de Esperanto", kies autor-rajtoj transdonis Heroldo de Esperanto al la Hispana Esperanto-Federacio. Oni esperas ke la libro, kiun eldonos *GRAM Ediciones S.C*, estos preta je la fino de la jaro. La eldonejo, faka pri lingvoj, subskribis kun MEL kontrakton pri distribuado de la duono de la ekzempleroj inter la librovendejoj.

**ESPERANTO EN INTERRETO**

Kompleta katalogo de libroj (4.100 titoloj), diskoj, kasedoj, videofilmoj, insignoj k.a. varoj vendataj de la Libroservo de UEA estas nun konsultebla en TTT: http://www.uea.org/katalogo

Nia kataluna samideano Oscar Puig i Cánovas kunlaboras en nova interreta superserĉilo "Metamonster", por la fakoj kataluna kaj esperanta. Jam oni povas viziti la esperantan fakon en la retadreso: http://www.metamonster.com/esperanto

La TTT paĝo de "genteIRC" malfermis babilejon en Interreto, per kiu oni povas laŭtvoĉe (kaj skribe) facile interparoli kun aliaj samideanoj tutmondaj tra nia PK (Persona Komputilo).
Oni ne bezonas specialajn programojn ktp. Nur havi en nia komputilo, konektitan mikrofonon kaj la laŭtparolilojn. http://www.genteIRC.com

En la serĉilo Lycos hispana vi povas trovi la paĝon "Avangarda serĉado" (Búsqueda avanzada): inter la proponitaj lingvoj en la "persiena" menuo, nur 16, troviĝas Esperanto! http://www.lycos.es

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

NI FERIOS ĜIS SEPTEMBRO, LA PROGRAMO DE AKTIVAĴOJ DE MADRIDA ESPERANTO-LICEO KONTINUOS EN OKTOBRO.

Vi ricevos la venontan numeron de Nia Voĉo je la komenco de Oktobro.

FELIĈAN SOMERON AL ĈIUJ !!!

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**